LSG FORUMO nr-o 145 (1/2011)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj



*LSG-jarkunveno 2011 en Kopenhago* *foto: rolf*

# "MI VOLAS INSTIGI LA MEMBROJN"

## *FORUMO parolis kun la nova prezidanto*

***Bonvolu prezenti vin mem. Kiu vi estas? De kie vi venas? Kiom da jaroj vi havas? Kiamaniere vi venis al Esperanto?***

Mi estas Randy Dean. Mi venas el Usono. Mi nun loĝas en Atlanto, en antaŭurbo de ĝi, kiun neniu konas ekster Usono. Mi havas 42 jarojn – mi foje provas forgesi tion. Mi ĉiam havis intereson pri lingvoj kaj aliaj kulturoj. Plurfoje mi vidis Esperanton, kaj finfine mi trovis vortaron kaj povis lerni iom de la lingvo. Ne multajn lingvojn ni povas lerni nur per vortaro, kaj tio ankaŭ donis al mi la intereson por Esperanto.

Mi sentis min ĉiam tute akceptita en Esperantio. Do kiam mi fine konstatis, ke jes ja mi estas samseksemulo, mi havis problemojn en kelkaj kampoj de mia vivo, sed neniam en Esperantio kaj tio eĉ pli profundigis mian amon al Esperanto.

***Rakontu ion pri via vivo en Esperantio.***
Ĉiutage mi interŝanĝas e-poŝtojn kaj mesaĝas ekzemple ĉe Ipernity. Mi spektas retpaĝojn, kiel tiuj de UEA, Libera Folio ktp. Granda parto de mia Esperanta vivo estas virtuala. Loke ni havas monatan kunvenon, kiun mi plejparte ĉeestas. Mi ne ofte iras al la landa kongreso, vere mi renkontas aliajn esperantistojn plej ofte ĉe la Universala Kongreso. Mi havas specialan intereson pri Eŭropo, do ĉiam mi provas, sed ne ĉiam sukcesas, partopreni la UK, kiam ĝi estas en Eŭropo. Tio estas la ”fizika” parto de mia esperanta vivo.

***Kiamaniere vi trovis la vojon al LSG?***
Mi estis varbita de membro de LSG, kiam mi partoprenis landan kongreson en San Francisko. Tiu membro vizitis Usonon pro la kongreso tie. Li tuj notis, ke mi estas gejo kaj alparolis min kaj ni amikiĝis. Li diras: ekzistas ja tiu organizo LSG – kial ne aliĝi. Mi membriĝis, sed en la komenco estis iom nebuleca afero por mi ĝis kiam mi venis al mia unua UK en Berlino en 1999. Tiam mi spertis tutan semajnon kun grupo da amikoj. Neniam mi estis sola dum la kongreso. Denove tiu akceptemo de mia gejeco profundigis mian amon al Esperanto kaj tio donis specialan parton de mia koro al LSG.

***Kaj de ordinara membro vi nun trovis la vojon al prezidanteco. Kia organizo estu LSG laŭ vi post 5 jaroj?***
Mi esperas viglan organizon, viglan konstante aperantan revuon kaj ke daŭre ekzistu tiuj renkontoj dum UK kaj eble ankaŭ ĉe aliaj kongresoj. Mi esperas vigle kreskantan membraron kaj ke la membroj sentas sin parto de ĝi. Mi ŝatus, ke la membroj ne nur pagas la kotizon kaj foje ricevas ion, sed ke ili sentas sin parto de vivanta organizo.

***Kiamaniere ni atingas tion?***
Mi volas instigi la homojn. Se ĉiuj, aŭ almenaŭ granda parto de ni, faras etan laboron ni povas realigi tion kaj finfine ĝi okazos. Espereble mi povas pensigi la homojn kaj finfine ni povas krei la celon.

***Kio estos via kontribuo por atingi tiun celon?***
Nu, mi certe konstante faros ion por Forumo. Mi ne estas verkisto, sed iel mi povas verketi. Mi ankaŭ volas enketi la membraron pri interesoj. Ofte estas afero de persona peto, do mi multe petas specife – tio ankaŭ povas havi alian efikon, do ni vidu, ĉu mi sukcesos aŭ ne.

Ni ankaŭ havu rilatojn kun ILGA (Internacia Lesba kaj Geja Asocio) kaj aliaj tiaj grupoj tra la mondo. Kiel prezidanto estas mi, kiu faras tiun kontakton, se ni pluigas.

***Kie vi vidas LSG en Esperantio?***
Momente mi ne vidas specifan kunlaboron kun aliaj grupoj, sed certe mi ne kontraŭas tion. Certe ni havas ion komunan kun la feminista movado – eble ni povas fari ion kun ili. Ankaŭ estas iu termina problemo ĉe ni - ĉu diri samseksema, geja, kvira, do eble ni povas kontribui al la terminologia fako

***Bone, ĉu ni vidos vian kunulon dum la sekvontaj kongresoj?***
Lastatempe mi havas kunulon, kiu ankoraŭ ne parolas Esperanton. Li estas muzikisto kaj tio estas lia persona aliro al Esperanto. Li nun estas komencanto kaj mi esperas, ke ni estonte povas vojaĝi tra la mondo per Esperanto. Bedaŭrinde li ne povis esti ĉi-tie, sed espereble venontfoje ni kongresos kune.

## LA PREZIDANTA RUBRIKO

Saluton karaj gesamideanoj, samliganoj, kaj legantoj de Forumo!

Mi nomiĝas Randy Dean kaj mi estas la nova prezidanto de LSG. Unue mi volas danki al mia antaŭulo Francis el Francio, speciale pro tio ke li restos en la estraro, por helpi nin. Mi ankaŭ volas danki la ceterajn estraranojn, kiuj bonvolis resti en la estraro: Arnold el Usono, Harry el Britio, Rolf kaj Sebastian el Germanio. Ankaŭ estas ĝojo por mi prezenti la novan teamon de Forumo. Wolfgang el Danio, Paweł el Polando kaj Robb el Usono estas redakcianoj, bedaŭrinde ankoraŭ vakas la posteno de ĉef-redaktoro.



*Bonvenon al la nova prezidanto* *foto: randy*

En ĉi numero de Forumo vi legos multajn raportojn pri LSG-aj aktivecoj dum la Universala Kongreso en Kopenhago. Unu eble ne tiom amuza, sed espereble pozitiva parto estis laborkunsido, laŭ ideo de Paweł. Ni diskutis la nunan staton kaj estontecon de LSG. Inter la temoj estis Forumo mem, inkluzivemo de LSG, nia TTT-ejo, eksteraj rilatoj, varbado, ktp.

Mi esperas, ke LSG kreskos kaj servos bone al la membraro. Tiucele estas en ĉi tiu numero enketo pri LSG kaj Forumo. Donu vian voĉon al via organizo. Laŭ mi pli inkluziva organizo pli bonas.

Bonvolu kontribui al la organizo. Kaj dankon al tiuj, kiuj jam faris. Mi ŝatus havi pli da virinoj, junuloj, ambaŭseks-emuloj, kaj transseksuloj inter ni. Ĉiuj sentu sin bonvenaj. Estus bone laŭ mi se ni havus rilaton al internaciaj grupoj, kiel ILGA.

Mi ĝojis vidi multajn el vi en la UK. Espereble mi renkontos eĉ pli da LSG-anoj kaj amikoj ĉe la 2013-a UK en Rejkjavik. Eble eĉ antaŭ tiam!

Ĉu vi havas komentojn por mi? Krom respondi al la anonima enketo, vi ĉiam povas e-poŝti al mi. Ĝuu la numeron, kaj ĝis poste! *Randy*

## LA PREZIDINTO SALUTAS

Kiam mi akceptis prezidi nian ligon dum ties jarkunveno 2008 en Roterdamo, mi (eble naive) opiniis, ke mi akceptis honorigan postenon, sed mi pli kaj pli konsciiĝis, ke ĝi postulas agemon en pluraj kampoj.

Post mia reelektiĝo dum la jarkunveno 2009 en Bjalistoko, mi malgaje konstatis, ke mia akcepto denove prezidi ĝin pli bremsis ol akcelis ĝian evoluon.

Tial mi sciigis al nia liganaro en la antaŭkongresa numero de Forumo, ke mi ne akceptos trian prezidentan mandaton, emfazante ke LSG bezonas novan sangon al- kaj elfluanta el sia kapo kaj donante preferon al an(in)o de la juna generacio.

Mi ĝojas, ke Randy Dean akceptis esti mia posteulo: mi certas, ke lia agemo estos pli vigla ol la mia, kaj mi esperas, ke li kontribuos al pli granda videbleco de nia ligo, precipe internaciskale, per

teksado de personaj interrilatoj kun estraranoj de ILGA.



*Francis kantis dum arta vespero* *foto: randy*

Kopenhage mi plezure restadis duafoje en julio 2011 post mia unua fojo en oktobro 2005 okaze de la 50jariĝo de la Eurovida Kanzonkonkurso kaj, malgraŭ la aŭtuneca vetero, mia dua restado en la dana ĉefurbo restos eĉ pli agrabla en mia memoro ol la unua: kiel prezidinto de LSG, mi laŭdis la gastamon de LGBT-Danmark, kaj kiel unuopulo, mi ĝojis kanti mian esperantigon de la korsiklingva kanzono reprezentinta Francujon en la ĉijara eldono de la jam menciita konkurso dum la Internacia Arta Vespero de la Universala Kongreso de Esperanto 2011! *Francis*




*foto: rolf*

## Protokolo de la ĝenerala kunveno de LSG dum la UK en Kopenhago

La kunveno okazis 24-an de julio 2011 ekde 16-a ĥoro en UK-kongresejo en salono „Noll“

1. La tagordo estis akceptita sen ŝanĝoj.
2. Protokolisto: Kiel protokolisto sin proponis kaj estis akceptita Arnold.
3. Kiel raportistoj por la UK-kuriero estis akceptita Arnold.
4. La protokolo de la lasta kunveno en Bjalistoko estis akceptita.
5. La kasisto Rolf donis ampleksan aktualan financan raporton de la ligo. La raporto per voĉdono estis akceptita unuanime. La kotizoj restas kiel en la lastaj jaroj (vidu kovrilpaĝo).
6. Landaj raportoj: Traktiĝis landa raporto el Pollando pri nia emblemo montrita en multelingva programo de manifestacio en Varsovio.
7. Ĝenerala agado kaj estonteco de LSG: Ĝisnuna prezidanto Francis ankoraŭfoje klarigis sian longe antaŭe anoncitan demision.


Krome la ĉeestantoj tute surprizita eksciis, ke kelkaj horoj antaŭe per retmesaĝo la ĝisnunaj redaktantoj de nia membrobulteno “Forumo” Maŭro el Italio kaj Juan el Hispanio kun tuja valido demisias. Longe la ĉeestantoj diskutis pri novan prezidanton kaj Forumo-redaktanton. Finfine Randy el Usono kandidatiĝis kiel prezidanto. Robb el Usono ofertis rete, kunlabori por Forumo - tial la ĉeestantoj akceptis la proponon de Arnold, demandi Robb, ĉu li pretas transpreni la respondecon por nia membrofolio.

Ofertis sin Wolfgang (Danio), Paweł (Pollando) kaj (rete) Thomas (Germanio)

active kunlabori por Forumo, sed ili ne volis transpreni la respondecon por ĝi.
Estis denove propono, serĉi kontakton kun ILGA. La kunveno decidis, ne oficiale kunveni en Hanojo. La estraro decidos 2012 pri loko de sekva jarkunveno (post Hanojo).
8. Estis pritraktita sub punkto 5.
9. La elektoj pri jenaj estraranoj estis unuanime:
Prezidanto kaj retprizorganto: Randy (Usono)
Sekretario kaj kasisto: Rolf (Germanio)
Estrarano pri varbado: Sebastian (Germanio)
Estraranoj: Arnold (Usono), Paul Harry (Britio), Francis (Francio)
10. Rezolucioj ne estas.
11. Rolf informis pri la lunda kunveno kun la dana gej-lesba organizaĵo LBGT, pri la merkreda LSG-ekskursi kaj la ĵaŭda budo en kongresejo. Randy invitis al laborkunveno por ĵaŭdovespero.
12. Tradicia unuminuta silenta omaĝo al forpasintaj LSG-anoj.
La kunsido estis fermita. *laŭ Arnold*

## ORFA FORUMO

Malpli ol 24 horoj antaŭ la ĝenerala kunveno la redaktintoj de FORUMO decidis demisii de siaj postenoj. Ili skribis en mesaĝo al la interreta grupo de LSG inter alie:
*Dum la unua jaro [la laboro] funkciis, ni ne renkontis teknikajn problemojn, sed jam de la komenco aperis klare, ke ni ne sukcesos plenumi la taskojn: decidi la artikol-temaron, trovi artikolojn, trovi fotojn, traduki al Esperanto el lingvoj, kiujn ni ne bone regas (precipe la anglan)... Ni fiaskis, ni ne sukcesis aperigi nian revueton kiel indus; dum la lasta jaro (pro diversaj kialoj) ni eĉ ne sukcesis aperigi ĝin entute. Neniu alia redaktanto aŭ helpo (plurfoje petata) intertempe sin prezentis, sed ni estis nur provizoraj redaktantoj por ke FORUMO ne malaperu. [...]Reaperu FORUMO kaj refloru nia Ligo.*



***LSG bezonas vin!***

Mi ne scias, kial necesas tian bombon, ĉar jam en la lasto eldono de Forumo, antaŭ la kongreso, povintus aperi tia anonco: nun per drameca gesto FORUMO fariĝis senredaktora.
Kompreneble tio estis vaste diskutata dum la ĝenerala kunveno. Inter alie anoncis sin pluraj helpantoj de FORUMO. Nun ni havas plurajn manojn, sed neniun kapon por fari la laboron. Pro tio LSG bezonas nepre vin – se vi havas

emon por doni vizaĝon de LSG, tiam nepre anoncu vin.
Mi redaktis FORUMOn dum kelkaj jaroj, foje kun sukceso, pli ofte sen, sed neniam estis teda tasko. Nuntempe mi ne povas / volas transpreni ian respondecon pri io en Esperantujo, sed mi povas esti en la fono, cetere vi havus vian aron da kapablaj kunlaborantoj aldone kun la aktiva subteno de la estraro.
Ĉiuj scias, ke redaktanto de LSG estas nemalhavebla posteno. Sen FORUMO la Ligo ne povas ekzisti, do nepre anoncu vin al la prezidanto.
PS: LSG ne povas ekzisti nur en la virtuala mondo, ĉar ĉ. kvarono de nia membraro loĝas en izolitaj lokoj kaj pro diversaj kialoj ne alkroĉas sin al interreto. Por tiuj liganoj LSG ofte estas la sola konekto al la geja mondo. Se ni ekzistus nur en la reto, ili perdus sian solan kontakton al la geja mondo kaj ni perdus ilin, kio estus nedezirinda situacio.
Dependas de vi, kiom longe daŭras la provizora stato. W*olfgang*

## VARMA AKCEPTO EN MALVARMA SOMERTAGO

La 1an de aŭgusto pli ol 30 LSG-anoj, kiuj partoprenis la UK–on en Kopenhago, en la vespero vizitis la sidejon de LGBT, la dana organizo por lesbaj, gejaj, biseksamaj kaj transseksaj homoj. En la urbo tiutempe okazis manifestacio kontraŭ la amasmurdo en Oslo fare de ekstremdekstrulo. Ekzistas ja ankoraŭ ĉiam menstorditaj figuroj, kiuj ne hezitas terori siajn samlandanojn.
Ĉe LGBT Vivi Jelstrup akceptis nin. Estis la intenco de 96-jara fondinto de la organizo Axel Axgil veni al la kunveno, sed pro aŭdproblemoj li rezignis pri tio. Li estis unu el la pioniroj de la dana movado por la rajtoj de samseksamuloj. La ĉeestantoj subskribis salutkarton al li, kiun Sven poste persone transdonis al li.
Jam en 1930 en Danlando oni forigis samseksamon el la krima sfero de juro. Kaj en 1989 Danio estis la unua lando en la mondo, kie gejoj kaj lesboj povis registrigi sian partnerecon. Ankaŭ la unua lando kie okazis seksŝanĝa operacio laŭ deziro de la paciento. Tamen ne eblas oficiala edziĝo en Danlando por paroj de la sama sekso. Tion ĝis nun malhelpis la konservativa plimulto en la parlamento, sed LGBT daŭre strebas al tia oficialigo. Lesbaj virinoj povas adopti infanon kaj ĝenerale samseksaj paroj povas kandidatiĝi por adoptaj gepatroj.
Ekzistas pluraj centroj de aktivado de LGBT en Danlando, sed plejparte en la grandaj urboj de la lando. La membronombro de LGBT fluktuas en la daŭro de la tempo. En la sidejo en Kopenhago estas librejo, kunvenejoj kaj ebleco por persona konsultado kaj konsilado.

Nuntempe, la plej gravaj celoj estas batalo kontraŭ malamaj krimoj (atencoj je gejoj kaj lesboj), akiri la rajton je samseksedz(in)iĝo en la luterana (ŝtata) eklezio, edukado en la lernejoj pri seksaj aferoj kaj samseksamo kaj subtenado de batalantoj por samseksamaj rajtoj en triamondaj landoj.
Fakte ne estas konate, ĉu la nombro da atakoj kontraŭ gejoj kaj lesboj kreskas aŭ ne, ĉar la polico laŭ Vivi Jelstrup ne serioze okupiĝas pri tiaj aferoj kaj emas rigardi en alian direkton kaj prisilenti tiujn atakojn. Tial oni ankaŭ volas

konvinki policanojn pri tio ke necesas fari ion kontraŭ tio.
La eduka laboro estas grava ankaŭ en Danlando, ĉar ofte junaj homoj havas antaŭjuĝojn kontraŭ gejoj kaj lesboj pro sia hejma eduko. La kleriga laboro en lernejoj okazas dank' al volontuloj de LGBT, kiuj duope vizitas la lernejojn kaj komencas diskuton pri samseksamo kun la lernantoj.



*Aktivuloj de LGBT en Kopemhago kun LSG-anoj Sven kaj Helen* *foto: randy*

La LSG-anoj povis starigi multajn demandojn pri la situacio en Danio, kaj Wolfgang lerte tradukis inter la dana la Esperanto. Poste alvenis multaj picaoj, tortoj kaj fruktoj, kiujn oni kun granda apetito formanĝis. Estis bonega regalo kaj ni multe ĝuis la etoson en la mansardo. Ĉe la fino, nia nova LSG prezidanto Randy dankis al Vivi, Wolfgang kaj Sven pro la bonega akcepto en Nygade 7.

Koran dankon al LGBT pro la varma akcepto! *Raportis Bert*

## NOVAJ VENTOJ EN KUBO

La socialista revolucio en Kubo estis malbona por gejoj – la nova registaro lanĉis persekuton de gejoj. Speciale la socialistoj malŝatis transvestitojn. Kun aŭ sen procezo gejoj estis senditaj al karcero aŭ al laborkampoj. En 2010 Fidel Castro, la tiama revoluciestro, transprenis la responson por tiuj hontindaĵoj. ”Antaŭ kvin jardekoj, pro gejfobio, gejoj marĝeniĝis en Kubo. Multaj estis senditaj al agrikulturaj aŭ militistaj laborkampoj, akuzitaj esti 'kontraŭrevoluziuloj'. Ni havis tiom da problemoj tiam, problemoj pri vivo kaj morto kaj ne sufiĉe atentis.”
Laŭ raportoj de rifuĝintoj el Kubo, Raúl, la frateto de Fidel havis specife sadisman gejfobian sintenon. Espereble tiu baldaŭ apartenas al la sterkejo de kuba historio. Ĉu estas ironie, ke ĝuste la filino de Raúl, Mariela Castro, estras la Nacian Centron por Seksa Edukado (Cenesex). Tiu centro klopodas klerigi kaj eduki la kubanojn pri la antaŭhaltigo de Aidoso kaj kontraŭkoncipo. La agado inkluzivas ankaŭ transseksulojn, ĉar ekde 2008 seksŝanĝo estas senpage en Kubo.

Dum la tago kontraŭ gejfobio la slogano estis: Ne gejoj estas la minaco – gejfobio estas.
La 7an de majo 2011 Mariela Castro malfermis la aranĝon ”Seksa diverseco sen diskriminacio” en Havano. Inter alie ŝi diris jenon:
”Gejfobio estas relative nova termino, kiu indikas kaj sintezas la abomenon, malamon, timon, antaŭjuĝon kaj diskriminacion kontraŭ gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj, transseksuloj kaj interseksuloj. Tamen, ĝia radikoj estas malnovaj kaj ne malsimilas al aliaj diskriminacioj, kiuj makulis la homan ekziston ĉie en la konata mondo.

Tiuj formoj naskis en la mezo de socioj kies ekonomioj baziĝis sur homekspluatado, kaj kies socia organizo estis establita sub la kontrola povo de malplimulto.




*Mariela Castro partoprenis la marŝon kontraŭ gejfobio en Havano*

Kiam la disdono de rimedoj estas arbitra kaj ili ne sufiĉas por ĉiuj, la plej senskrupulaj malplimultoj alpropigas ilin al si mem kaj disdonas ilin laŭ siaj propraj profitoj kaj privilegioj. Tiel kreiĝis malegalecoj kune kun antaŭjuĝoj kaj tial ankaŭ kreiĝis argumentoj por pravigi kaj altrudi la subigon de 'aliuloj', 'malsimiluloj'. Tio, okazas nuntempe inter alie kun la suda kaj neurba loĝantaro, virinoj, neblankuloj, malriĉuloj, samseksemuloj, transseksuloj.

La pli ol dudeka sperto kun lesboj, gejoj, ambaŭseksemuloj kaj transseksuloj en la scienc-humanisma kadro de Cenesex, nin permesas certigi, ke se la socio ne konfirmas politikon konforme al tiu realo, tiuj personoj estos daŭre viktimoj dum sia tuta vivo. La plej komunaj esprimoj de diskriminacio transiras de agresemaj eldiroj, de ekskludo de la familia medio ĝis la fizika agreso, mortigo, penigo en 76 landoj kaj la apliko de mortopuno en 5 landoj de la mondo. Ĉi tiu estas unu el la motivoj, kiu kompromitas al Kubo kun la LGBTa loĝantaro kaj al senpatologigo de transsekseco.

Ni petas, ke ne perdu tempon eltrovi, kial homoj estas diversaj kaj neimageblaj. La nura fakto, ke ili ekzistas postulas la bezonon krei respektemajn kunvivajn manierojn. [...]"

*Laŭ informo el Kubo,*
*aldona materialo de Wolfgang kaj Arnold*

***Aldona noto de Arnold***

Estinte fonto de supra rimarko pri Raúl Castro mi aldonas, ke la subpremo de gejoj en socialismaj landoj ne estas ekskluzive atribuebla al ekpluato de rimedoj per antaŭe priveligiita socia tavolo. La gvidantoj de socialismaj socioj mem gvidis tiun diskriminacion, aparte Raúl Castro, do, tiu diskriminacio ne okazis pro neglekto kaj deviigaj pezaj taskoj.

Sole en Kubo oni konstruis koncentrejojn por suferantoj de AIDSo. Internaciaj sanorganizoj konsilis kontraŭ tia konstruado. Eventuale ankaŭ Kubo forlasis tiun unikan kuban specon de diskriminacio.

Mi mem bonvenigas ŝanĝon en la konduto de kuba registaro. Mi bonvenigas ŝanĝon en konduto de kubaj registaranoj. Sed kiel amiko de gejaj kubanoj fuĝintaj el diskriminacio, mi sentas devon atesti pri alia versio de tio, kio okazis en Kubo antaŭe. Mi estas preta sendi al petontoj plenan tekston de Gabriela Castro kaj en la hispana kaj en traduko de kuba esperantisto. Mia e-poŝta adreso estas en kolofono.

# TRA LA MONDO

**Ekvadoro: 30 klinikoj de "kuracistoj de gejeco" fermitaj (15.08.2011)**

Ekde jarkomenco la aŭtoritatoj en Ekvadoro fermis 30 klinikojn, en kiuj samseksemuloj devis esti "sanigataj".

Tion raportas la ĉiutaga gazeto "El Diario". La klinikoj pekas kontraŭ la malpermeso de diskriminacio en la konstitucio de Ekvadoro, deklaris proklamisto de la ministrejo por sano. Fono: La lando de 14 milionoj da enloĝantoj en la jaro 2008 akceptis novan konstitucion, en kiu la unan fojon estis malpermesata la malprivilegigo pro seksuala orientiĝo. Ekde tiam ankoraŭ ne plu estas permesata trakti samseksemon kiel malsanon.

Gegejaj grupoj tamen supozas, ke la fermoj nur estas "akvoguto sur ardanta ŝtono": Dise en la lando laŭfame ankoraŭ ekzistas 200 pluaj de tiaj klinikoj. Proklamistino de la gegeja grupo "Fundación Causana" deklaris, ke multaj "kuracistoj de gejeco" laboras en resanigaj centroj por drogodependuloj. La medicinistoj procedas en tio tre brutale, kiel raportas Paola Ziritt, hodiaŭ 28-jaraĝa, kiu estis "terapiita" dum du jaroj. "Mi pasis tri monatojn tute sola en unu ĉambro, ne havis lumon, kaj estis katenita per mankaptiloj" Ŝia propa patrino liveris Ziritt'on en la klinikon.

Tra la tuta mondo unuiĝoj de psikologiistoj kritikas la t.n. "konversigan terapion", ke ĝi esti danĝera, ĉar laŭ ili la seksa orientiĝo ne estas ŝanĝebla – kaj ĉar la "kuracistioj de gejeco" per siaj traktadoj kaŭzas je junaj homoj psikajn problemojn, kiuj ofte finiĝas en memmortigo. Tamen ankaŭ ekz. en Germanio oni ankoraŭ aplikas similajn metodon, plej ofte surbaze de religiecaj argumentoj. Tiel, la unuiĝo de katolikaj kuracistoj rekomendas, kuraci gejojn kaj lesbojn helpe de naturkuracaj rimedoj.

*Informis Bernvardo*

**Britio: Gejoj post unu jaro de ĉasto rajtas donaci sangon (06.09.2011)**

La brita ministrejo por sano proklamis, ke gejoj ekde nun rajtas donaci de sia sango – kondiĉe ke ili dum unu jaro ne amoris samsekse.

La nova regulo ekvalidos en Anglio, Kimrio kaj Skotio je la 7a de novembro. Ankoraŭ ne certas, ĉu la ŝtatoparto Nordirlando aliĝas al la regulo. Ĝis nun en la Unuiĝinta Reĝlando tute ne rajtis donaci de sia sango, sen konsidero kiom ofte ili amoris aŭ amoras. La malpermeso estis establita en la 1980aj jaroj kadre de la aidoso-kulmino.

Faka komisiono de la registaro estis diskutinta dum 18 monatoj pri la novreguligo de la malpermeso por gejoj donaci sangon. Unue, en aprilo diskoniĝis, ke la registaro alstrebis permesi al gejoj la donacadon, kiuj dum dek jaroj ne estis amorintaj.

Gegejaj grupoj aplaŭdis la anoncitan liberumigon. Ili tamen kritikis, ke jam nun gejoj estas alie taksataj ol malgejoj: "Estas misproporcio, ekskludi dum unu jaro ĉiun viron, kiu amoris kun viro. La malpermeso validas, eĉ se nur okazis orala amoro", deklaris Ben Summerskill de la grupo "Stonewall". Li postulis, ke ĉiuj sangodonacantoj – sendepende de siaj seksaj orientiĝoj – estu taksata

individue laŭ la infektiga danĝero.

Ekzistas pluraj ekzemploj de landoj, en kiuj gejoj devas submeti sin al periodo de ĉasto por kvalifiki sin donaci sangon. Tiel la atenda tempo en Nov-Zelando ampleksas dek jarojn, en Sud-Afriko kvin. En Usono nur viroj rajtas donaci sangon, kiuj post 1977 ne amoris geje – do de 34 jaroj.

*Informo de Bernvardo*

**Ugando: Ministraro haltigas mortpunon por gejoj (19.08.2011)**

La Uganda ministraro haltigis la "leĝon kontraŭ homoseksualeco", kiu dediĉis la mortpunon por gejoj – tamen kelkaj parlamentanoj ŝajne volas plu batali pro ĝi.

Kiel raportas la "Daily Monitor", la registaro estas maltrankvila, ke akrigon de la leĝoj kontraŭ samsekuloj povus fortimigi helpdonantajn landojn kaj partojn de la populacio. Adolf Mwesige, la advokato de la registara partio NRM, laŭ nekonata fonto deklaris dum ministara kunsido, ke Ugando povas realigi la jam ekzistantajn leĝojn pli restriktive, ne endanĝerigante la evoluigohelpajn monojn. Post tio la ministraro kunsentis la malakcepton de la leĝo.

Jam nun en Uganda eblas mallibereja puno de 14 jaroj por "kontraŭnatura amoro". Per la nova leĝo oni celis enkonduki la mortpunon por "grava" homoseksualeco. Krome, ĉiuj personoj aŭ organizoj, kiuj faras "varbadon por homoseksualeco" estu punataj – per tio ekzemple la laboro de aidoso-helpoj estus senebla. Aparte perfida estas la parto de la leĝo, kiu minacas ĉiun homon per mallibereja puno ĝis tri jaroj, kiuj ne anoncas gejojn aŭ lesbojn ĉe la administracio.

La aŭtoro de la leĝo, David Bahati, spite ne volas rezigni pri "leĝo kontraŭ homoseksualeco" kaj riski disputon kun la ekzekutivo. Bahati estas membro de la registara partio NRM. Li eksplikis dum intervjuo, ke nur kun la nova leĝo Uganda estus morale armita: "La futuro de la infanoj en tiu ĉi lando dependas de tio, kiel voĉdonas la reprezentantoj de la popolo en la parlamento". La delegito Otto Odonga deklaris, leĝokoncepto povus esti proponita ankoraŭ en aŭgusto. Tamen ŝajnas neverŝajne, ke la delegitoj povas akiri aprobon kontraŭ la registaro.




La leĝo unue en la jaro 2009 estis debatata de Bahati en la parlamento. El tio sekvis pasia kritiko en Eŭropo kaj Ameriko. Pluraj landoj minacis, ke ili malgrandigos la evoluigan helpon. En la loĝantaro tamen la strikta sinteno kontraŭ gejoj kaj lesboj estas tre populara. Tiel respondis je internacia enketo de la Pew Research Center lastjare 79 % de la Ugandanoj, ke samseksemo estas "morale malĝusta". Tamen, la nombro de la malamantoj de gegejoj laste malgrandiĝis. Je enketo de la sama instituto en la jaro 2007 ankoraŭ 96 % de la enloĝantoj esprimis sin kontraŭ samseksemo.

*Informo de Bernvardo*

## Novjorko: Geja edziĝo

Post longedaŭra kaj diligenta laboro, novjorkanoj atingis sukceson. Post facila aprobo inter la malsupra leĝodonantaro, ŝtata senato per eta plimulto aprobis agnoskon de edziĝo ankaŭ por gegejoj. Tri respublikanoj voĉdonis por aprobo, do, la plimulto estis 33-29. Unu demokrato voĉdonis kontraŭ. Antaŭe, eĉ kiam estis plimulto de demokratoj, plimulto pora ne estis atingebla. Evidente en respublikanaj distriktoj estiĝis forta premo favora al la propono.



Kvankam la lastaj gubernieстroj aprobis ĝin, ili nenion efikis. La nuna, nova gubernieстro Andrew Cuomo sukcese gvidis la aprobon. Li subskribis ĝin ĵus post aprobo, ĝustatempe por laŭta laŭdo dum marŝado kape de sekvataga gejfiera parado tra Nov-jorkurbo.

La urbestro Michael Bloomberg, longedaŭra apoganto, petis permeson de geja stabano, ke li mem gvidu ties edziĝfeston, do, la urbestro mem havigis al si rolon en la unua ceremonio, kiu okazis kelkajn semajnojn post oficiala aprobo. La lasta urbestro Rudolph Giuliani ankaŭ apogis gejan edziĝon post sia embarasa divorco. Li devis lasi edzinon kaj filon en urbestra domo kaj mem transloki al loĝejo de amikoj, geja paro, kun kiu li feliĉe loĝis dum kelkaj monatoj.

*Informis Arnold*

## Memoro pri 9-11

Antaŭ preskaŭ dek jaroj mi verkis artikolon pri afiŝoj sur la muro de mia loĝdomo. Ili restis tie dum monatoj, poste estas translokigitaj al portiko de trastrata malsanulejo, kiu kuracis vunditojn dum la katastrofo. Finfine ĉifriĝis la papero por vetero, kaj ili finfine translokiĝis por konservado al muzeo.

Por mi la plej kortuŝa estis: "Ni scias, ke mortis nia patro, sed ni petas iun ajn informon pri io dum lia lasta horo." Tiutempe ankaŭ pendis sur ĉiu el dekkelkaj arboj laŭlonge de tiu strato foto de patrino portanta bebon en siaj brakoj. Sube estis peto por informo pri ŝi. Mi memoris la nomon kaj, kiam "New York Times" verkis serion de nekrologoj pri ĉiu pereinto, mi serĉis ŝian nomon kaj leksciis ŝian sorton: La 11-a de septembro, 2001, estis la unua lerneja tago por la filo. Lastamomente ŝi decidis lasi al la patro sian taskon konduki filon al lernejo, kaj anstataŭe ŝi iris al laboro en alta etaĝo de Monda merkata centro.

Semajnon post la evento en montrofenestro de vendejo en apuda strato aperis peto por la familioj de fajrobrigadistoj. El dekunu, kiuj iris al Monda merkata centro, revenis kvar. Pro tio, ke perdiĝis ankaŭ la fajrovagono, la brigadejo ne uziĝis dum kelkaj monatoj. Monteto de floroj konstante ornamis ties vojeton al la strato. Tiu eta brigado gardis min dum 35 jaroj tie loĝantan.

*Arnold el Novjorko*

## La COC-manĝoklubo en Harlemo

Ne ni ne manĝas COC, nek ion kio similas. Ni manĝas en restoracioj aŭ ĉe la membroj hejme, ĉu vegetare aŭ nevegetare.

La ideo de manĝoklubo por gejoj kaj lesboj venis fakte de mi, kiel ne tro serioza sugesto ĉe iu enketo de la loka COC-grupo en Harlemo, Nederlando. COC estas la organizo por emancipiĝo de gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj kaj transeksuloj en Nederlando.

En 2005 mi sugestis en la enketilo ke oni starigu manĝoklubon kiu kunvenu ekz. unufoje monate por manĝi en iu restoracio ne tro kosta en Harlemo aŭ en la apudaj urbetoj kaj vilaĝoj.

Oni petis al mi komenci realigi la ideon kaj helpis per anonco en la loka retejo de COC. Mi memoras ankoraŭ, ke kvarope ni kunvenis la unuan fojon en iu restoracio, kie oni preparas rapidfritatan manĝon. Estis tri viroj kaj unu virino.

La ideo de la manĝoklubo estas simpla: ni kunvenas en fiksita tempo (unua vendreda vespero de la monato) kaj ni elektas restoracion kiu ne estas tro kosta. Sugestoj por restoracioj estas bonvenaj. Se ne estas sugestoj, mi elektas du eblajn ejojn kaj oni montru sian preferon. Ĉiu havas retadreson, ĉar alie oni ne povas facile interkonsenti pri lokoj k.t.p.

Kelkfoje ni kunvenas ĉe membroj hejme, ekzemple ĉar ili festis sian naskiĝdatrevenon. Tiam ĉiuj kunportas ion por la vespermanĝo, ĉu memfaritan aŭ ne. Pasintan 3an de septembro ni kunvenis 12-ope ĉe lesba paro kiu invitis la grupon. La plej granda nombro da partoprenantoj estis 16 personoj. Ne devas esti ankoraŭ pli, ĉar tiam oni fariĝas kvazaŭ vojaĝagentejo… La aĝo estas inter 40 kaj 70 jaroj (ne intence).

En 2009 la prezidantino de la loka COC-klubo venigis min kaj kelkajn aliajn membrojn de la manĝoklubo al Harlema restoracio kaj kun aliaj invititoj ŝi oficiale honoris min per “Oscar”-o. Statueto de viro en roza koloro, kun orumita kravato kaj la subskribo “eetclub-Bert”. Mi ne povas nei ke mi estis agrable surprizita pri tio kaj la roza Oskaro nun staras en mia ŝranko.

Jen, kiel ni manĝas kaj manĝas konstante kaj havas agrablan vesperon kune. *Bert*


**KOLOFONO:**

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

interretejo: http://lsg-esperanto.org

membriĝo: ĉe la sekretario

kotizoj: 12 € por 1 jaro / 30 € por 3 jaroj / 300 € por dumviva membreco



Prezidanto: Randy DEAN [laprezidanto@gmx.net]

Sekretario kaj Kasisto: [lasekretario@gmx.net] [lakasisto@gmx.de]

LSG, Rolf KÖHLER, Bergstr. 78,
DE - 01069 Dresden, Germanio

Estrarano por varbado: Sebastian KIRF [kirf@gmx.de]

Kromaj Estraranoj:

Arnold VICTOR [arvimide@earthlink.net]

Harry BARRON [phsb@orange.net]

Francis SOGHOMONIAN[fsoghomonian@yahoo.fr]


Sendu abunde kontribuojn por via membrogazeto FORUMO antaŭ la **30a de novembro 2011** al:
[laredaktanto@gmx.net]
aŭ al la helikpoŝta adreso de la sekretario.

***Nepre ne kontaktu la ĉeĥan personon sur la etikedo de la koverto. La persono ne estas ligano. Nur pro la pli favoraj poŝttarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio.***